

& Kulureporko:

< Ripete 13 sed rekante 9 el 21 batoj por strofo, entute 378 paŝoj dum 6 minutoj.
Norda Kantaro #4496. De la provinca limregiono inter Vestmanlando kaj Dalekarlujo.
El sveda tradukis Kukoletto (oe) kaj Martin Strid (strofon '12b, 2015). Klarigoj (*): '1
Loj = ili. '8 Vizaĝo: homo.>

(#Melodio:

<1,2:21> (

o;So /do3re mido falmi re falmi re;So do3re mido solfa mimi solfa mi;So do3re mido
fami rere fami redo SoTi do

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Estis kampara2no, -ra2no, ; kaj
havis li porke2ton, porke2ton ; Loj*
nomis ĝin Kulurepork', Kulurepork',
Kulurepork',

'2 La porko havis (': ka2pon,) (:
ka2pon, ;) sufiĉan por (': kaba2no,) (:
kaba2no ;)

(×: Loj nomis ĝin (Kulurepork'),)×3)

'3 De l' porko jam la trunko nur
videblis super templa tur'

'4 La porko havis pie2dojn ke
homoj emis ce2dojn

'5 La porko kreskis ki[el in]und'
porkejon stamfis al la grund'

'6 Stokejon iris da farun' kaj manĝis
la porko je tuta tun'

'7 La porko fosas en agra kamp'
Kampulo jen en tima kramp'

'8 La porko ekstaris en vilaĝ'
Arbaren fuĝis ĉiu vizaĝ'*

'9 La porko iris sur blua mont'
videblis ĝi de ĉiu front'

'10 La porko staris sur monta rand'
Ĝin vidis tuta sveda land'

'11 Rajdisto venis rajda2nte kaj la
porko venis kria2nte

'12a La glavon tiris li de l' uj'
mortpikis tiun porkon tuj

'12b La glavon tiris li de l' ing'
mortigis tiun porkon sving'

'13 La porko blekis, sanga ŝpruc'
dek kvin barelojn kaj grandkruĉ'

'14 Li trenis la porkon al la hejmo
Kvin tagojn ĉion faris mem

'15 Loj metis la karnon en tinojn kun
sal' kaj tamen restis pli en hal'

'16 Kuiris bulkojn el la sang'
Finfrandis vilaĝana lang'

'17 Ja mortis fine Kulurepork' Ĝin
manĝis ĉiuj bone per fork'